Deklaracio de la Kataluna Esperanto-Junularo pri la loĝeja krizo kaj la ĝenerala striko

Antaŭparolo

En la lastaj jaroj, la Kataluna Esperanto-Junularo (KEJ) kreskis kaj firmigis sian ĉeeston kaj en la kataluna junulara movado kaj en la junulara Esperanto-movado. Kiel junulara asocio, nia agado ne limiĝas al la disvastigo de Esperanto kaj la organizado de lingvaj kaj kulturaj renkontiĝoj. Ni estas ankaŭ parto de la socia kaj asocia vivo de Katalunio, kaj nia identeco estas nedisigeble ligita al la kernaj valoroj de la Esperanto-movado: solidareco, egaleco, socia justeco, homaj rajtoj kaj internacia interkompreniĝo.

La defendo de tiuj valoroj postulas, ke ni ne restu indiferentaj antaŭ la gravaj sociaj problemoj, kiuj tuŝas nian socion; des pli antaŭ tiuj, kiuj tuŝas precipe la junularon. Kiel aktiva parto de la kataluna junulara movado, KEJ konsideras, ke ĝi havas la respondecon esprimi sian pozicion kaj engaĝiĝi en la lukto por pli justa socio.

Tiusence, KEJ ne povas resti silenta antaŭ la profunda loĝeja krizo, kiu jam de multaj jaroj trafas la Katalunan Landaron kaj grandan parton de Eŭropo, nek antaŭ la kreskanta socia mobiliziĝo por postuli urĝajn solvojn.

Problempriskribo

La rajto je digna kaj atingebla loĝejo estas fundamenta homa rajto, agnoskita en la internacia juro kaj jam inkluzivita en la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj de 1948. Loĝejoj devas servi antaŭ ĉio al la bezono de homoj havi sekuran kaj stabilan hejmon, ne esti traktataj nur kiel komercaĵoj aŭ instrumentoj por spekulado kaj privata profito. Tamen, la nuna situacio montras profundan kontraŭdiron inter tiu principo kaj la realaj vivkondiĉoj de granda parto de la loĝantaro.

En la Kataluna Landaro, la konstanta altiĝo de luprezoj, la nesufiĉa kvanto de publikaj kaj socialaj loĝejoj kaj la kreskanta spekulado pri nemoveblaĵoj igas la aliron al loĝejo ĉiam pli malfacila. En Barcelono, ekzemple, la inflaciĝustigita luprezo kreskis je 41 % dum jardeko, dum la salajroj kreskis nur je 3,9 % inter 2013 kaj 2023. Krome, en Katalunio socialaj luloĝejoj reprezentis nur 1,25 % de la ĉefloĝejoj en 2021, kompare kun eŭropa mezumo de ĉirkaŭ 8 %. Al tio aldoniĝas aliaj sociaj kaj ekonomiaj problemoj, kiel amasa turistumado, gentriĝo de kvartaloj kaj laborista malstabileco. La situacio aparte trafas junulojn, kiuj ofte ne povas emancipiĝi, devas dediĉi grandan parton de siaj enspezoj al lupagado aŭ estas devigataj forlasi siajn kvartalojn kaj urbojn. Laŭ tutŝtataj datumoj, junulo inter 16 kaj 29 jaroj

bezonus dediĉi averaĝe pli ol 100 % de sia salajro por sole lui loĝejon. La rajto konstrui sendependan vivprojekton fariĝas privilegio anstataŭ reala eblo por ĉiuj.

La konsekvencoj de tiu krizo ne estas nur ekonomiaj. La loĝeja malstabileco, la minaco de eldomigo kaj la perdo de propra hejmo povas havi detruajn sekvojn por la digno, sano kaj bonfarto de homoj. Nur en 2025, en la Kataluna Landaro okazis pli ol 10 600 juĝe plenumitaj eldomigoj. La lastatempaj mortoj de Olga kaj Javier en L'Hospitalet de Llobregat kaj de Maricarmen en Madrido, en kunteksto de eldomigoj aŭ ilia minaco, estas doloraj ekzemploj de la homa sufero ligita al tiu krizo.

Antaŭ tiu situacio, la socia reago fariĝas ĉiam pli forta. En la lastaj monatoj, amasaj manifestacioj, protestoj kaj mobiliziĝoj tra la Kataluna Landaro kaj aliaj teritorioj montris la kreskantan postulon pri efektivaj solvoj. Loĝejrajtaj sindikatoj, najbaraj organizaĵoj, laboristaj sindikatoj kaj junularaj asocioj unuiĝas por kontraŭbatali la spekuladon kaj rentismon kaj postuli, ke la publikaj institucioj garantiu la rajton je loĝejo. Tiu mobiliziĝo kulminos per la Ĝenerala Striko por la Rajto je Loĝejo, kunvokita por la 11-a de novembro 2026.

Celo

Per ĉi tiu deklaracio, la Kataluna Esperanto-Junularo celas esprimi sian firman engaĝiĝon por la defendo de la rajto je digna loĝejo kaj sian solidarecon kun ĉiuj homoj trafitaj de la loĝeja krizo, precipe kun la viktimoj de eldomigoj.

KEJ konsideras neakcepteble, ke spekulado kaj rentismo profitu el fundamenta homa bezono, dum ĉiam pli da homoj renkontas malfacilaĵojn por havi aŭ konservi hejmon. Tial ni postulas de la publikaj institucioj urĝajn, efikajn kaj strukturajn rimedojn, kiuj metu la rajton je loĝejo antaŭ spekulajn interesojn kaj garantiu dignajn vivkondiĉojn por ĉiuj.

Samtempe, KEJ volas esprimi sian subtenon al ĉiuj aliaj sociaj movadoj, kiuj defendas tiujn rajtojn, kaj kontribui al ilia diskonigo kaj internacia solidareco.

Alvoko al agado

La Kataluna Esperanto-Junularo:

- **reasertas** sian engaĝiĝon por la defendo de homaj rajtoj, socia justeco kaj la universala rajto je digna kaj atingebla loĝejo;
- **esprimas sian profundan zorgon** pri la loĝeja krizo, kiu trafas la Katalunan Landaron kaj Eŭropon ĝenerale, kaj aparte kondamnas ĝiajn konsekvencojn por la junularo kaj la plej vundeblaj homoj;

- **kondamnas** la nemoveblaĵan spekuladon kaj rentismon, kiuj subordigas fundamentajn homajn bezonojn al ekonomia profito kaj kontribuas al la kreskanta loĝeja malegaleco;
- **postulas** de la publikaj institucioj urĝajn kaj strukturajn rimedojn por kontraŭbatali la loĝejan krizon, protekti homojn kontraŭ eldomigoj kaj garantii efektivan aliron al digna kaj atingebla loĝejo;
- **esprimas sian solidarecon** kun ĉiuj homoj trafitaj de la krizo kaj kun la loĝejrajtaj organizaĵoj, sindikatoj kaj sociaj movadoj, kiuj luktas por la defendo de niaj rajtoj;
- **esprimas sian oficialan subtenon** al la Ĝenerala Striko por la Rajto je Loĝejo de la 11-a de novembro 2026 kaj al la mobiliziĝoj por postuli socian justecon kaj efektivan garantion de loĝejaj rajtoj;
- **alvokas ĉiujn esperantistojn tra la mondo** solidariĝi kun la homoj trafitaj de la loĝeja krizo, partopreni en pacaj mobiliziĝoj kaj aktive engaĝiĝi en la kolektiva lukto por la rajto je digna loĝejo.

Per ĉi tiu deklaracio, KEJ reasertas sian volon esti aktiva parto de la junulara movado kaj kontribui, laŭ siaj valoroj kaj ebloj, kaj pere de la internacia lingvo, al la konstruado de pli justa kaj solidara socio. La solidareco, kiun ni antaŭenigas per Esperanto, ne konas landlimojn kaj devas konkretiĝi ankaŭ en la defendo de la fundamentaj rajtoj kaj digno de ĉiuj homoj.

L'11 de novembre, aturem-ho tot pel dret a l'habitatge.
Ni gent sense casa, ni cases sense gent!

La 11-an de novembro, ni haltigu ĉion por la rajto je loĝejo.
Nek homoj sen hejmo, nek hejmoj sen homoj!